



«Sardegna speaks english» Sardinio parolas la anglan

«Sardegna Speaks English» (Sardinio Parolas la Anglan) estas nova multmilionia projekto por enkonduko de la angla en eŭropa regiono...



Daŭras plue la alkulturiga agado en la Malnova Kontinento fare de la bonŝancaj posedantoj de la nuntempa internacia ĉefkomunikilo, la angla lingvo.

Baldaŭ ni tamen devos kompreni iom pri la angla lingvo, se oni volas ne senti sin fremdulo inter samlandanoj, tiom disvastigitaj estas ja anglaj vortoj, kiuj, iom pro realaj terminologiaj postuloj sed multe pli ofte pro mensa pigreco aŭ elmontrado, trapunktas eŭropajn lingvojn. Tion tre bone komprenis la Liberaldemokrataj Reformistoj de Sardinio (Riformatori Liberal

Democratici Sardi), kiuj volas esti «avangardaj» en procezo de plena angligo de Eŭropo per Projekto *Sardegna Speaks English*, sub la ŝildo de la brita flago, kun en la centro la sarda simbolo kun kvar nigrolulaj kapoj.

Prezente la projekton, la grupestro de Reformistoj en Regiona Konsilio deklaris: «Temas pri konkludo de pli ol trijara laboro, kiu ekiris de la konvinko, ke la utiligo, flanke de ĉiuj sardoj, de la angla kiel komunikilo povas esti la definitiva ŝultropuŝo por disfali la fizikajn kaj kulturajn barilojn, kiuj disigas Sardinion de la restanta mondo».

Komisiita pri la kondukado de la projekto esta «Aŭtoritato pri la Angla», kreita ĉe la Prezidanteco de la Regiono kaj subtenita de *British Council*. La proponita investo, «tute ne timante kritikojn», laŭ la teksto de la komunikilo, atingas 500 milionojn da eŭrojn. En februaro okazos pluraj manifestacioj por apogi la projekton kaj oni invitas gravulojn

el politika, kultura kaj entreprena medioj al subskribo de manifesto por subteno de la iniciato.

Antaŭ kelkaj jaroj — diras De Ĝovani — la tiama prezidanto de *British Council*, Ĉarlo Trougton (Charles Troughton), parolante pri instruado de la angla eksterlande, agnoskis, ke «milionoj da homoj ne sukcesas lerni lingvon tiel kompleksan kiel la anglan, kaj ke por internaciaj rilatoj estas spaco ankaŭ por Esperanto, lingvo multe pli facila. Tamen verŝajne la nunaj instruaj rimedoj estas tiom plifajnigitaj, ke ili igas la anglan taŭga por ĉies lernokapablo». Fakte la programo estas direktita al ĉiuj sardoj, de la turismaj agantoj en Kosta-Smeralda (Costa Smeralda) ĝis silentemaj loĝantoj de Barbaĝo (Barbagia). Kaj ankaŭ por plifortigi la financojn de la popolo de Albiono.

El la redakcio de www.gxangalo.com
la 31an de Januaro 2004

«Inglese, internet e imprese»

En français: La politique linguistique sarde n'est pas née du néant. Tout un contexte de politique générale, culturelle et surtout éducative explique cette prise de décision par les personnes actuellement au pouvoir en Italie.

Durant la campagne électorale au printemps 2001, Silvio Berlusconi a promis aux Italiens que son gouvernement serait celui des «trois i».

«Trois i», nouvelle trinité, en fait concept marketing (en France on connaît déjà ce type de phraséologie prim-ministérielle: rien ne s'invente, tout se recycle...) pour mieux vendre et faire accepter la nouvelle ligne politique éducative qui tient en trois mots: «inglese, internet e imprese» autrement dit «anglais, internet et entreprise». Pour ce gouvernement, ce concept des «trois i» doit diriger l'éducation, de l'éco-

le élémentaire à l'université, de plus, il vise aussi à une mise en concurrence des écoles, car selon lui, la concurrence «est le seul critère garantissant la qualité».

Le but de cette politique éducative est d'asservir le système scolaire, pris dans la tourmente économique de la mondialisation, à des logiques commerciales et ainsi à l'orienter vers la satisfaction des désirs de l'économie et des profits immédiats, plutôt qu'à une culture pour tous, dans la diversité.

Ce plan des «trois i» fait partie d'un plan général de réforme de l'école italienne. Autre concept miraculeux, le projet «Une école pour grandir» verrait les enfants entrer en maternelle à deux ans et demi, au lieu de trois (note: alors qu'actuellement beaucoup condamnent cette pratique), et le primaire débiter six mois avant les six ans. Ensuite, l'école obliga-

toire pourrait à nouveau s'arrêter à 14 ans, contre les 15 ans introduits par le précédent gouvernement. Quant à «l'obligation» de se former, elle s'arrêterait à 18 ans, voire 17. À cela s'ajoute le fait que l'école obligatoire subirait une cure d'amaigrissement de ses horaires, lesquels pourraient être amputés de 20%. Autour de ces réformes, les critiques n'ont d'ailleurs pas tardé à se faire jour. En décembre, les états généraux de l'école, convoqués par Letizia Moratti (ministre de l'éducation), se sont achevés en forme de farce, après que 70 000 manifestants aient assiégé le Palais des congrès. Le 13 avril 2002, plusieurs dizaines milliers de personnes sont descendues dans les rues des principales villes du pays pour contester le projet. Pour Tullio de Mauro, ancien adjoint du précédent ministre de l'Instruction publique Luigi Berlinguer,

cette réforme vise à « créer un système de consommateurs analphabètes, avec des citoyens de première division et d'autres de seconde division ».

Dans tous les pays européens, la même politique s'applique sous des formes et à des

rythmes de moins en moins différenciés. Seul point positif de ces décisions : pour doper l'utilisation des technologies de l'information le gouvernement italien offre à chaque Italien de 16 ans une prime de 150 euros pour l'achat d'un ordinateur.

Pli koncize en Esperanto: La sardina lingvo-politiko ne naskiĝis el nenio. Tuta kunteksto de ĝenerala, kultura kaj eduka politiko klarigas tiun ĉi decidon far la nun regantaj personoj en Italio.

Dum kampanjo en printempo 2001, Silvio Berlusconi promesis al geitaloj, ke sia registaro estos registaro de la « tri i ».

La « tri i », nova triunuo, fakte estas komerca koncepto por pli bone vendi kaj akceptigi la novan politikan cellinion pri edukado, kiu koncizigas kaj konkludas sin laŭ tiuj ĉi tri vortoj: « inglese, internet e imprese » t.e. « La angla lingvo, interreto kaj entrepreno ». Por tiu registaro, tiu ĉi koncepto de la « tri i » nepre regu edukadon de elementa lernejo ĝis universitato. Krome, ĝi ankaŭ celas konkurencigon de la lernejoj, pro tio, ke, — laŭ lia opinio — konkurenco ja estas « la

ununura distingilo garantianta kvaliton ». La celo de tiu eduka politiko estas sklavigi la sistemon, forprenita en ekonomian tutmondiĝ-turmenton, laŭ komercaj leĝoj, kaj tiele direkti ĝin al satigo de ekonomiaj deziroj kaj de tujaj profitoj, anstataŭ kulturo por ĉiu, en diverseco.

Tiu ĉi plano de la « tri i » estas parto de pli ĝenerala plano de reformo de itala lernejo. Alia koncepto mirakla estas la projekto « Lernejo por maturiĝi », kiu planas pli frue enlernejigi la infanojn.

(...)

Plie aldoniĝas al tio la fakto, ke deviga lernado trasuferas malgrasigon de sia lernotempo: minus 20 procentoj malpliigo de lernohoroj.

Pro tiuj reformoj, kritikoj ne malfruiĝis. En Decembro 2002, kunvenego por lernejo, asignita de Letizia Moratti (ministrino pri

Quelque 540 000 adolescents pourraient bénéficier de cette aide. Seule obligation : il faudra justifier d'un abonnement à un fournisseur d'accès à internet.

Cyrille

Article recomposé à partir de divers articles glanés sur internet

edukado) finiĝis fars-maniere, post kiam 70 000 manifestaciantoj sieĝis kongrespalacon. La 13an de Aprilo 2002, dek-miloj da personoj surstratmarŝis en la ĉefajn urbojn por kontesti la projekton.

(...)

En ĉiu eŭropa lando, la sama politiko aplikiĝas laŭ diversaj formoj, kaj laŭ ritmoj malpli kaj malpli malsimilaj.

Nura pozitiva punkto pro tiuj decidoj: por stimuli uzadon de informad-teknologioj, itala registaro decidis donaci al ĉiu 16-jara italo monpremion de 150 eŭroj por aĉeto de komputilo. Ĉirkaŭ 540 000 geadoleskantoj povus profiti tiun ĉi monhelpon. Estas nur unu devigo: ekaboni aliĝon al la Interreto.

Cyrille.

Artikolo reverkita el diversaj artikoloj plukitaj el la interreto.

Por Esperanto dum ferioj

Malkovru tiun ĉi ateston, de juna rumano el Oradeo (urbo apud hungara landlimo), kiun mi ricevis perrete. Dankon al Alberto pro lia freŝa verkaĵo kaj al Irina, lia patrino, pro transdono.

Dum la someraj ferioj mi vojaĝas kun la gepatroj al la Nigra Maro, kie mi devas pasiĝi 18 tagojn por kuraci min pri alergias astmo. Tiu kuracado estas bon-efika, dank' al kiu mia san-stato pli kaj pli boniĝas.

Ĉi-foje ni ricevis kurac-eblecon en la marborda urbeto Tekirgiolo, kie jam en la unua tago mi amikiĝis kun tre afabla 15-jara knabo Andrei POP el urbo Bistrita Nasaud. Dum nia babilado, mi menciis al li, interalie, pri Esperanto kaj pri la mirinda amikeco, kiun oni povas krei tut-monde pere de ĝi. Ŝajne mi sukcesis vekti grandan intereson kaj entuziasmon de la knabo, ĉar li petis min tuj instrui al li almenaŭ la alfabeton kaj kelkajn uzeblajn frazojn. Jen, tiel okazis, ke mi ekinstruis Esperanton al Andrei jam en la unua tago. Li estis ege

ĝoja kaj komencis lerni kun granda plezuro kaj entuziasmo.

Poste, ankoraŭ en la sama tago, okazis al li agrabla surprizo. Kiam mi renkontis lin denove ĉe la manĝejo, kun granda entuziasmo li rakontis al ni, ke iu afabla 72-jara maljunulo demandis lin, ĉu li aŭdis iam pri Esperanto? Tio estis ege agrabla surprizo por ni ĉiuj.

Poste, Andrei prezentis nin al tiu afabla maljunulo, s-ro Ivan GRIGORE el urbo Piatra-Neamt. Ni sciiĝis pri tio, ke li eklernis Esperanton dum sia jun-aĝo, en 1956, dank' al la revueto *Rebus*, en kiu lian intereson kaptis titolo « LERNU ESPERANTON EN 10 LECIONOJ ». Tiel li eklernis, do, nian lingvon, post ĉiu leciono li senpacience atendis la sekvontan numeron. Sed, bedaŭrinde, li trovis nur ses lecionojn el la promesitaj dek. Kaj poste li neniam plu aŭdis pri Esperanto kaj nenian lernomaterialon li sukcesis trovi, malgraŭ ke li multe interesiĝis dum longaj jaroj, sed senrezulte. Estis al ni ege kortuŝa la rakonto de s-ro Ivan, liaj grandaj entuziasmo kaj ĝoj-

ego, ke li renkontis nin kaj retrovis Esperanton pere de ni post tiom multaj jaroj.

Vidinte la entuziasmon de s-ro Ivan Grigore kaj lian grandan deziron ekscii pli multe pri Esperanto kaj pri ĝia movado. Ni (la patrino kaj mi) multe rakontis al li kaj ankaŭ al Andrei. Ni decidis kunveni ĉiutage en nia ĉambro. Ni fervore instruadis Esperanton al ili ambaŭ, dum la tuta tempo de nia restado ĉe la maro.

Antaŭ ol vojaĝi hejmen, ni promesis plu helpi ilin en la lernado pere de korespondado. Ni donacis al ili po unu ekzempleron da revuoj *Juna amiko* kaj *Bazaro* por ekzerci sin en la lingvo helpe de ties legindaĵoj.

De tiam papere kaj rete ni helpadas ilin kaj esperas ankaŭ novan renkontiĝon ĉe la maro kaj, eble, ni eĉ havos la plezuron de ilia baldaŭa vizito ĉe ni, en Oradea.

Alberto Nagy, Rumanio

nagyirina@yahoo.com

www.geocities.com/nagyirina/Esperanto